

& La gaja studento:

< Ripete 24 el 41 batoj por strofo, entute 246 paŝoj dum 3 minutoj. El germana? tradukis nekonato.>

(#Melodio:

<:4,5> (h /So3So dodo mimi so; /fami re mire do; /So3So dodo mimi so; /fami remi do o; /re3mi remi remi re; /re3re mifi soSo So; /So3So dodo mimi so; /fami re mire do; /So3So dodo mimi so; /fami remi do o)×6)+

(&Strofoj:

'1 Jen studento antaŭ vi,

(×:; **Ju-kaj-da, ju-kaj-di, ;**)

Ano de l' Akademi',

(×:; **Ju-kaj-da, kaj-di, ;**)

Esti juna kaj student', ; Ho, plej gaja vivmoment'.

(×:; **Ju kaj di-a-di-a-da ; Ju kaj di, ju kaj da, ; Ju kaj di-a-di-a-da, ; Ju kaj di-a-da.**)

'2 Venas onkla poŝtmandat', La unuan de l' monat' La poŝtiston kun honor' ; Tiras mi al mia kor'.

'3 Ho, biero kaj kolbas'! Plena estas mia kas' Ho! plezuro kun fraŭlin', ; Kiel mi amegas vin!

'4 Ĝoji pro la sankta pag' Volus mi je ĉiu tag', Sed la mono, ve, ho ve, ; En la poŝo restas ne.

'5 En la mezo de l' monat' Mi en l' universitat' Ofte studos kun fervor' ; Ĉar la mono estas for.

'6 Glas' kaj poŝo sekaj nun! Grava estas mia pun', Do se mi amuzis vin. ; Volu vi regali min.)